

NJE elkore invitas vin al

KABANA SEMAJNFINO

en la arbaro de Østfold, unu kaj duona horo sudoriente de Oslo.

Venu por umi kun ni en mojosa etoso, for de ĉiu alia!

La kabano vin atendas vendredon la 4an de aprilo, kaj ni vojaĝos hejmen dimanĉon la 6an de aprilo. Estos kuna vojaĝo de Oslo per buseto la 3an (jes, la tagon antaŭe!) je la 18a horo, kaj per trajno la 4an je la 16a. Post tio vi devas mem trovi trajnon de Oslo ĝis Moss, kaj anonci vian alventempon en Moss al Heming (vidu kontaktinformojn sube) plej laste la 2an de aprilo.

Partoprenkotizo estas NOK 300 aŭ EUR 30. Rabato je NOK 100 aŭ EUR 10 se vi kontribuas al la programo. Ni akceptas norvegan monon kaj EUR-biletojn, kaj la sumo pagindas al bankokonto 0540.08.27364 nome de Norsk Esperantoungdom, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo, plej laste la 16an de marto. Kunportu vian kvitancon. Surloka kontanta pago eblas se vi tion anoncas en via aliĝo.

ALIĜILO

Por aliĝi, bonvolu sendi retpoŝton al kabana.semajnfino@silisium.net plej laste la 16an de marto kun la jenaj informoj pri vi:

- vian plenan nomon
- vian sekson
- vian naskiĝjaron
- viajn retpoŝtadreson kaj telefonnumeron (poŝtelefono se vi havas)
- ĉu vi kontraŭus dividi dorĉambron kun homo(j) de alia sekso
- ĉu vi manĝas kion ajn / vegetare / vegane / tute ne / nur ĵaŭde / ktp.
- ĉu vi preferus vojaĝi per la buseto de Oslo
- ĉu vi povus kontribui al la programo kaj per kio
- ĉu vi rezignus pri lito se vi devus dividi duoblan liton kun iu
- ĉu vi preferus duoblan liton dividitan kun certa homo (donu ties nomo)
- ĉu vi preferus dormi en la sama ĉambro kun certa homo (donu ties nomon)
- se vi aĝas malpli ol 18 jarojn: skriban permesilon de viaj gepatroj/respondeculoj (en esperanto aŭ la norvega)
- iun ajn alian informon, kiun vi taksas grava (ekzemple alergia kontraŭ certa manĝaĵo)

Se en via aliĝilo mankas iun de la ĉisupraj informoj, ni divenos vin ĉionmanĝanton, rezignantantan pri ajna lito, kaj sufiĉe perdiĝeman. **SE VI NE MENCIAS VIAN**

NASKIĜJARON EN LA ALIĜILO, ĜI NE ESTOS TRAKTATA. Via aliĝo validos nur post skriba konfirmo de NJE.

Membroj de NJE kiuj loĝas ekster Oslo/Asker/Bærum rajtas je repago de 75 % de siaj vojaĝkostoj laŭ plej malmultekosta vojaĝmaniero, sed maksimume NOK 1000. Nepre kunportu kvitancojn aŭ kopiojn de biletoj. Monat- aŭ semajnkartoj por loka transporto ne estos repagitaj.

Se vi ricevos lokon en la buseto de Oslo la 3an, vi ricevos apartan retmesaĝon kun informoj pri kie kaj kiam trovi la buson.

PROGRAMO

- Ĵaŭdon la 3an de aprilo
 - Alveno de gastigantoj kaj fruvenantoj
 - Hejtado kaj klarigo de la kabano
- Vendredon la 4an de aprilo
 - Alveno de Ĉiuj aliaj
 - Interkona vespero
 - Via programero
- Sabaton la 5an de aprilo
 - Amuziĝa tago
 - Via programero
- Dimanĉon la 6an de aprilo
 - Via programero
 - Pakado, ordigo kaj lavado
 - Forveturo je la 18:30 al trajnstacio en Moss
 - Forveturo je la 20:00 al Oslo

GRAVAJ INFORMOJ PRI LA EJO

Estas entute 8 litlokoj, el kiuj du estas okupataj de la gastigantoj. Do la SES UNUAJ ALIĜINTOJ ricevos liton. Ĉiu alia dormos surplanke (kunprenu matraceton). Estas entute loko por 13 partoprenantoj (krom la gastigantoj), do via aliĝo validos nur post skriba konfirmo de NJE. En la konfirmo estos menciata ĉu vi ricevos liton kaj en kiu ĉambro vi dormos.

En la kabano loĝas unu hundo, do se vi alergias aŭ timas hundojn, vi partoprenas je propraj risko kaj respondeco. Kompreneble la hundo ne estas timinda ;-) Tamen, estas unu dormĉambro kie la hundo ne rajtas esti, do diru al ni, se vi alergias, kaj vi ricevos dormlokon en tiu ĉambro.

La kabano estas meze de granda arbaro, kaj la plej proksima kuracisto/vendejo/elektrokonekto/akva nesecejo estas unu horon for.

La kabano estas tradicia norvegstila, nome malgranda, kun elektro de sunkaptiloj nur por lumigxo, hejtado per ligno, kuirado per gaso aŭ ligno kaj ege primitiva necesejo (verdire sitelo) – kiun de tempo al tempo iu devas malplenigi.

Pro la distanco de la ejo al kie ajn, partatempa partoprenado eblas nur se vi venas per propra aŭto.

Ĉiujn rubaĵojn necesas reporti hejmen. Nepre NE ĵetu rubojn ekstere.

Fumi vi rajtas fari ekstere, sed nepre kolektu Ĉiun cindron kaj cigaredrestaĵojn en cindrujo. Nepre ne malplenigu cindrujon ekstere, en la necesejon aŭ en la fornon, sed Ĉiam nur en la cindrositelon.

La Ĉirkaŭaĵo estas belega, kun multaj eblecoj por longaj kaj mallongaj promenoj en la pura naturo aŭ sur la vojetoj. Ĉe la vojetoj estas aliaj kabanoj, bonvolu respekti la privatecon de ili kaj iliaj enloĝantoj.

Pro tio ke ne estas akvo en la kabano, vi lavos vian korpon per unu el du metodoj

1. sola, per lavtuketo (kiun vi mem kunportas) kaj varma akvo en lavujon, aux
2. kun amiko ekstere, kie oni verŝas aŭ ĵetas akvon unu sur la alia ĝis ambaŭ estas puraj.

NEPRE KUNPORTU

- dormsakon
- ludojn/ludilojn
- muzikilojn
- rideton
- unu objekton, kiu diras ion pri vi aŭ estas grava por vi (por interkona vespero)
- bantukon
- bonajn Ŝuojn por promenado en arbaro (Ĉiu devas marŝi duonan kilometron de la parkejo ĝis la kabano)
- pantoflojn, dikajn lanŝtrumpojn aŭ purajn Ŝuojn por uzi en la kabano (planko malvarmas)
- helpemon (Ĉiu ricevas po kelkaj tasketoj tage por kontribui al la komuna bonfarto)

Por aliaj informoj kontaktu nin per retpoŝto al kabana.semajnfino@silisium.net aŭ voku Heming telefone per 402 04 250 (SMS eblas).